N-ro 2 - 2019

Martinus Institut

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

**Martinus:**
La leĝo de la vivo kaj ties promeso

**Martinus:**
La konscio kaj la feliĉo

**Martinus:**
La vivkuraĝo

**Ole Therkelsen:**
La sekreto de la piramido (1:3)

Resuma klarigo de simbolo n-ro 12

**Demando kaj respondo:**
Ĉu la rekono de reenkarniĝo influos al la monda moralo?

**Javier Romero:**
Prelego pri nova monda moralo



© Martinus Institut 1981 Reg. 12

*La kombinoj de la bazaj energioj*


Esperanto

# La leĝo de la vivo kaj ties promeso



**1.1 La vivleĝo**
La maniero manifesti, kiu en la Patro ekzistas kiel la absolute plej perfekta por la difilo, estas tiu, kiu estas en kontakto kun la leĝo de la vivo. Ĉi tiu leĝo efektive enhavas nur unu ununuran paragrafon. Tiu ĉi paragrafo aperas ĉizita per vivaj fajroliteroj sur la senfina fono de la eterneco, aperigitaj per la povo de la eterna ĉeesto de la dia Patro, kaj brilas al ni renkonten, en la formo de ĉio, kion ni ĝis nun travivis, kaj ĉio, kion ni en la estonteco travivos, kaj manifestiĝas en tradukita kaj reduktita formo kiel kelkaj malriĉaj vortoj direktitaj al la difilo en la jena maniero:

"Vi estu ĝojo kaj beno por ĉio al kio vi rilatas, tiel ke mia ĉeesto sentiĝu en ĉiuj viaj manifestaĵoj, por ke vi estu malferma kanalo por mia lumo, tiel ke, kie ajn vi aperos, neniu plu devu migri en mallumo, sed pere de vi povu min vidi, kaj per tio ricevu la amon, feliĉon, beaton, vivon, lumon, povon kaj gloron, kiujn mi estas preparinta por ĉiu unuopa difilo, kaj per tio vi mem kiel sunsimila estulo retroviĝos kiel mia elsendita vivdonanto kaj mesaĝisto sur la planedoj aŭ mondoj, kiujn mi taksos maturaj akcepti aŭ percepti ĉi tiun ĉielan mesaĝon en tia origina formo de manifestado aŭ radiado kiel tiu, kiun mi ĉi-rilate kaj ĉi-kongrue estas al vi doninta kiel via persona por manifesti."



*Tiun ĉi malgrandan tekston Martinus subskribis kaj per manskribo aldonis la jarindikon "1929". Temas pri malgranda eltiraĵo el la antaŭlaboraĵoj por Livets Bog, La Libro de la Vivo, kiu tiam ankoraŭ ne estis eldonita. Unua publikigo: La revuo Kosmos 1983 (4-5). Artikolo n-ro: M1472. Eldanigis Henning Sato von Rosen.*

# La konscio kaj la feliĉo

de Martinus



M0050

**1. Kie la vivkondiĉo estas mortigi**
Ĉiuj vivaj estuloj havas konscion, sed la konscioj ne estas same detalaj. La konscio de la planto estas nur senteto-konscio. La planto kapablas nur senteti diferencon inter "agrablo" kaj "malagrablo". Male la konscio de la besto ne estas nur senteto. La besto kapablas ankaŭ travivi maldorme tagokonscie. Ĝiaj travivaĵoj povas esti doloro, aŭ ili povas esti bonfarto, ne nur kiel senteto, sed ankaŭ kiel reala, konscia fakto. Tial la konscia vivo de la besto celas protekti ĝin kontraŭ dolorigaj kaj mortigaj travivaĵoj. Sed la bestoregno ja grandskale havas la vivkondiĉon, ke la bestoj devas vivteni sin per organismoj de aliaj bestoj, kaj tial ilia konscio samgrade adaptiĝas al tiu stato. Ĝuste tiu mortigokonscio realigas la vivon de la tigro kaj la leono, ja mallonge dirite de ĉiuj karnomanĝaj bestoj. La feliĉo de la rabobesto dependas tute de tio, ĉu ĝi kapablas venki kaj mortigi tiujn bestojn per kiuj ĝi devas vivi. Se la rabobesto invalidiĝas tiel ke ĝi ne plu kapablas mortigi, tiam ĝi ne povas konservi sian vivon kaj sekve sian feliĉon. Tiam ĝi mem estos mortigita aŭ necese mortos pro malsato. La feliĉo de la rabobesto sekve dependas komplete de ĝia kapablo mortigi.

**2. La homo kaj la mortiga principo**
Sed kiel statas la feliĉo de la tera homo? De kiu stato de konscio ĝi dependas? Rigardante tiujn homojn kiuj estas plej proksimaj al la besto, ni vidas ke ankaŭ ilia feliĉo estas bazita sur ilia kapablo mortigi. Mortigi simple estas ilia religio. Ni ĉiuj konas la nordian mitologion laŭ kiu neniu, kiu ne mem mortigis aŭ mem estis mortigita, povis veni en ĝian "ĉielan regnon", Valhalo. La plej grandaj herooj estis tiuj kiuj mortigis plej multajn. La mortigo simple estis idealo, estis la vojo al la plej alta feliĉo. Kaj kiel statas la nuntempaj homoj, la tiel nomataj "modernaj homoj"? Ĉu ne ankoraŭ sur multaj kampoj la kapablo mortigi estas la feliĉo por ili? Kial la homoj realigis la du lastajn grandajn mondmilitojn, ja entute ĉiujn militojn kiujn la historio montras inter nacioj kiel ankaŭ inter unuopaj homoj? Ĉu ne ĉiuj tiuj militoj estis komencitaj por savi la feliĉon? Kaj ĉu ne la moderna komerca principo havas la saman bazon, senkonsidere ke la atingitaj profitoj estas komplete nemoralaj? Ĉu ne ni vidas ke homoj ĉirkaŭ ni fraŭdas kaj rabas por akiri la feliĉon? Ja eĉ sinmortigon homoj faras por savi la feliĉon, ĉar tiun agon ili ja faras nur por eviti la malfeliĉon aŭ la supozatan malfeliĉon.

**3. Por la planto kaj besto la avido pri feliĉo ne estas problemo**
Por la planto kaj besto tiu avido pri feliĉo ne estas problemo. En tiuj vivstadioj la viva estulo ankoraŭ ne havas la kapablon havi aliajn avidojn ol la fakte vivkondiĉajn. Sed por la tera homo estas alie. Pro sia multe pli evoluinta konscio ĝi havas avidojn kiuj neniel ajn estas vivkondiĉoj, sed kies kontentiĝo

tamen estas konsiderata kiel neceso por sperti la perfektan feliĉon.

### 4. La avido de la homo pri imagitaj statoj de feliĉo

Nuntempe la plej granda problemo por la homo estas, ke male al la besto ĝi havas kapablon avidi aferojn kiuj ne estas vivkondiĉaj por ĝi, sed eĉ ofte rekte mortodanĝeraj. La homo havas multegon da avidoj kies kontentiĝo laŭ supraĵa vidpunkto ŝajne estas feliĉo, sed kiuj detruas ĝian sanon, ĝian ĉiutagan bonfarton, ĝian ĉiutagan bonan rilaton al la ĉirkaŭuloj, detruas ĝian ĉiutagan ekonomian bazon ktp. Tia feliĉo sekve ne estas vera feliĉo, sed male estas kamuflita bazo por la kreado de malfeliĉa sorto.

### 5. Per kontentigo de eraraj avidoj la homo mem kreas sian dolorigan sorton

La sola vera kaŭzo de ĉio, kion ni komprenas kaj spertas kiel malfeliĉon, do estas eraraj avidoj. Sed la avidoj havas sian bazon en la konscio. Kaj konscio plena de eraraj avidoj povas ja doni al sia posedanto la senton de feliĉo nur per kontentigo de tiuj avidoj. Sed la kontentigo de tiuj avidoj estas ja rekte malfeliĉiga, kaj tial la homo kreas per siaj eraraj avidoj sian propran malfeliĉon, sian propran dolorplenan sorton. La sola vojo al stabila kaj neskuebla stato de feliĉo sekve estas elpurigi tiujn ararajn avidojn el sia konscio, kaj anstataŭe progresigi tiujn avidojn kiuj solaj kondukas al la dezirata celo.

### 6. Kiamaniere oni distingas inter la ĝustaj kaj falsaj avidoj

Sed kiamaniere oni povas eltrovi kiuj avidoj estas la ĝustaj, kaj kiuj estas falsaj? Ja kiel oni eltrovas kiuj plantaj semoj estas la ĝustaj kaj kiuj estas la falsaj? Tion oni vidas sur la kampo. Kampo kun trudherbo nepre havis falsajn semojn? Kaj homa konscio havanta grandajn regionojn, kies feliĉo baziĝas sur kontentiĝo de nenaturaj avidoj, principe estas la samo kiel kampo kun trudherbo. Same kiel la trudherbo estas damaĝa kaj malhelpas kreskadon de la ĝusta semo, tiel la kontentiĝo de la falsaj avidoj estas damaĝaj por la kontentiĝo de la naturaj avidoj. Ili fariĝas trudherbo en la konscio. Tiu “trudherbo” identas kun malbonhumoro, senesperiĝo, melankolio, malsano, vivabomeno, timo, pesimismo ktp. Tiuj statoj reduktas kaj paralizas ĉian konscion kaj malhelpas la ekĝermon kaj kreskadon de la vivĝojo, optimismo, sano kaj bonfarto.

### 7. Ne estas strange ke la homo ne estas feliĉa

Surbaze de tio ne estas strange ke la moderna homo ne estas feliĉa, ĉar ĝi ne kapablas distingi inter semo kaj trudherbo kiam temas pri la ago pri semi la kampon de la propra feliĉo. Ĉar tiu kampo sur kiu la homo devas produkti sian propran vivfeliĉon estas nenio alia ol ĝia konscio. Kiel ĉiu alia kampo kiu estu pri semata, tiel ankaŭ tiu konscio devas esti plugita, erpita kaj elpurigita de eventualaj trudherboj por ke la rikolto, kiu estas ĝia sorto, povas fariĝi la travivado de sano, bonfarto, optimismo, ĝojo kaj vivemo.

### 8. La ĝustaj semeroj de la vivrikolto kaj feliĉa sorto de la homo

Sed kio estas la ĝustaj semeroj, la ĝustaj avidoj por la homo? Por la evoluinta homo la ĝustaj avidoj aŭ la normala vivaŭ sortosemo povas esti nur avidoj kies kontentiĝo estas ekskluzive kreado de ĝojo kaj beno por ĉio viva. Ĉiu avido celanta ion ajn alian estas nur falsa avido kaj sekve povas doni nur falsan feliĉon. Sed kiel aspektas nuntempe la konscio de la ordinara homo? Kiom da procentoj da bona rikolto ĝi havas, kaj kiom da

procentoj da trudherbo troviĝas en tiu rikolto? Ĉu ne pri tio la respondo necese estu ke nuntempe la konscio de absolute la plej multaj ordinaraj homoj principe estas kampo kun grandega amaso da trudherbo, tio signifas mortigajn avidojn kun iliaj efikoj aŭ konsekvencoj? Grandaj nekulturitaj terenoj estas regataj de avidoj pri nikotino, alkoholo kaj aliaj detruaj venenoj. Alia grandega regiono, kiu ankaŭ estas sovaĝejo, estas la avido de la homo pri animala nutraĵo. Antaŭ longe la homo forkreskis tiom de la besta stato ke por ĝi ne plu estas vivkondiĉo mortigi bestojn por vivi. Male fariĝis vera vivkondiĉo por ĝi ne mortigi kaj sekve plenumi la kvinan ordonon. Nek per buĉilo aŭ glavo, nek per ĉaspafilo aŭ hidrogena bombo ĝi povas produkti puran grenan kampon en la menso, tio signifas la absolutan feliĉon. Konservi kaj realigi la mortigajn avidojn sekve signifas rikolti por si mem nur kardon anstataŭ la sanan pangrenon.

### 9. Kiam malamikeco eniras en la menson, tiam la feliĉo eliras

Sed en la konscio de la tera homo troviĝas ankaŭ aliaj damaĝaj kaj mortigaj avidoj. Tio estas ekzemple la sinteno al ĝiaj malamikoj. Havi malamikojn kaj kulti malamikecon signifas efektive ekbruligi la grenejon de sia konscio kaj forbruligi la bonan rikolton troviĝantan tie. Neeviteble sekvas spirita malsatmizero se ne tiu fajro estingiĝas. Neniu homo povas iam ajn atingi la perfektan feliĉon pere de malamikeco. Kie floras la malamikeco en la konscio de homo, tie ĝi forbruligas la semerojn de la feliĉo. Kie malamikeco eniras en la menson, tie la feliĉo eliras.

### 10. Ĉu oni povas eviti malamikecon?

Ĉu vere oni povas eviti malamikecon? En tiu evoluepoko kie la homaro nuntempe troviĝas, oni ne ĉiam povas eviti ke iuj homoj sentas malsimpation, ja eĉ malamikecon al ni, sed tio ne signifas ke oni lasu sin infekti de tio kaj sekve esti infektita de malamikeco kontraŭ tiuj homoj. Pro malamikeco fare de aliaj homoj al ni, oni mem ne bezonas plenigi sian propran menson per malamikeco kaj per tio detrui la rikolton de feliĉo por si mem. Oni povas male klopodi plenigi tiun terenon en la konscio per la plej amaj pensoj pri la koncernulo, memorante ke en ĉiu momento neniu homo povas esti alia ol ĝi estas. Ĉiu homo ja necese rigardu la vivon surbaze de tiu talento aŭ komprenkapablo kiun ĝi aktuale posedas. Postuli ion alian estas esprimo de nura malsaĝo. Tio signifus semi trudherbon en sia propra tritiko.

### 11. La plej profunda kosma analizo de la vera feliĉo

La plej rapida vojo al la absolute perfekta feliĉo sekve estas mem purigi sian propran mensan semon. Forigi la trudherbon de la tritiko kaj semi nur la puran semon. La semo de la feliĉo montras, ke oni estas libera de ĉiuj avidoj kiuj kontraŭas la propran deziron esti per sia vivo beno por ĉiu kun kiu oni kontaktiĝas. Evoluigi la avidon fariĝi estulo "laŭ la bildo de Dio simila al li", alivorte fariĝi brila mensa suno kiu povas sendi la lumon kaj varmon de la vivo en absolute ĉiujn regionojn de la malfeliĉo, kaj tie forigi la mortigajn avidojn el la sortoregionoj de niaj malfeliĉaj kunhomoj, kaj per la fajro de nia amo konduki ilin antaŭen por fariĝi unu kun la radiabundo de la vizaĝo de Dio – tio estas la plej profunda kosma analizo de la vera feliĉo.

*Originala dana titolo "Bevidstheden og lykken". Prelego en Martinus Instituto la 6-an de novembro 1955. Manuskripto prilaborita de Erik Gerner Larsson kaj akceptita de Martinus. Unua publikigo en Kontaktletero n-ro 20, 1956. Artikolo n-ro: M0050. Traduko Ib Schleicher 1996*





*Martinus ĉe skribotablo en sia salono en Martinus-Instituto*

## CITAĴO DE MARTINUS

*Kiom da dormo individuo bezonas, ne eblas doni regulon komunan por ĉiuj, ĉar tio estas tre individua afero. Sed oni devas almenaŭ dormi tiom, ke laŭ natura maniero oni vekiĝas per si mem. Kaj se en ligiteco kun tio oni uzas nur purajn kaj noblajn pensklimatojn, do la menciita natura vekiĝo estas akompanata de sento de tia bonfarto kaj tia loboremo, ke ĉia penso pri daŭrigo de la ripozo aŭ la enlita kuŝado plej altgrade estas malagrabla, kial plej rapide oni forlasas tion por en brila humoro kaj vivoĝojo iri renkonte al la travivadoj, faraĵoj kaj okazaĵoj ligitaj al la nova tago.*

Martinus: *Sepulto*, 56-a Ĉapitro

# La vivkuraĝo

de Martinus



M1450

**1. La homa deziro al martireco**
Ĉiuj homoj bezonas scii ion pri la vivkuraĝo. Ĉar tiu homo, kiu posedas la veran vivkuraĝon, estas nevenkebla rilate al negativaj fortoj. Dum homo ankoraŭ opinias, ke ekzistas io, kio estas malĝusta, tiel longe la koncernulo estas en disharmonio kun la vivo. Dum oni sentas malĝojon kaj incitiĝon aŭ fariĝas amara aŭ ofendita, oni ne ekhavis la veran rigardon al la vivo, kaj sekve ne havas la veran vivkuraĝon. Kelkaj homoj eĉ mortigas sin mem pro mankanta vivkuraĝo. Tamen, ilia vivo ne finiĝas per tio, sed la malfacilaĵoj prokrastiĝas al la venonta enkarniĝo. Preferinde oni restu en sia fizika organismo tiel longe, kiel ĝi estas uzebla.

Kio do necesas por ekhavi la veran vivkuraĝon kaj ĝin konservi? Oni devas lerni ami sian proksimulon kiel sin mem. Tio donas vivkuraĝon kaj konservas ĝin. Sed kial la homoj tiel ofte perdas la vivkuraĝon? Ĉar la vivo ne estas tia, kia ili imagas kaj deziras ke ĝi estu. La speco de pensado, kiu plej subfosas la vivkuraĝon, estas martireco. Martireco estas unu el la plej danĝeraj malamikoj de la homoj, ĉar ĝi estas vivmensogo. Efektive martireco ne ekzistas. Neniu povas efektive suferi maljuste, kaj neniu povas agi majuste. Se iu povus tion fari, kaj se io en la vivo estus hazardo, la homoj neniam povus fidi ion ajn, kaj tiam la universo estus en malordo. Sed tiel ne estas, la universo male estas en la plej bela ordo, kaj esprimas la plej altan logikon. Nenio okazas pro hazardo, kaj kiam la homoj havas malĝojojn kaj ĉagrenojn kaj sentas sin kiel martiroj, la kaŭzo estas, ke ili kredas aŭ sentas, ke io maljusta estas farita kontraŭ ili. Tian martiran senton povas kaŭzi la rilato al la fortoj de la naturo. La terokulturisto sentas sin kiel martiro, kiam la rikolto estas malsukcesa aŭ la bestoj fariĝas malsanaj kaj mortas. Ankaŭ rilate al la naturkatastrofoj la homoj sentas sin martiroj, kiam la elementoj furiozas, kaj ili staras senhelpaj kaj senŝirmaj meze de potenca naturo. La plej ordinara formo de martireco certe ekzistas en la rilato al aliaj homoj. Se iu ĝenas kaj kalumnias onin, oni supozas, ke tiu persono agas malice, ke oni estas martiro kaj maljuste traktata. Tiam oni uzas amason da energio al negativaj pensoj, sentoj kaj memkompato, kio plej altgrade estas malsaniga kaj psike kaj fizike. Per la kosmologio oni venas al la kompreno, ke efektive ne ekzistas malbono en la mondo, kaj ke ĉio estas amo kaj intelekto. Tion ĉi kompreni estas por la homoj tre malfacile, sed estas tre grave, ke ili venas al tiu kompreno. La universo estas esprimo de la plej alta kaj brila perfekteco. Sed ĉar la homoj ne konsideras la tutan universon, sed nur lokan regionon, ili daŭre tendencas juĝi erare. Se muŝo rampas sur bildo, kie ĉio, kion ĝi momente povas vidi estas nigra, ĝi, se ĝi povus paroli, dirus, ke la tuto estas nigra. Tiel la homo povas fariĝi “nigravidulo” aŭ pesimisto, ĉar ĝi

ne havas superrigardon pri la pli granda kosma interligiteco, de kio la tiel nomata nigra koloro nur estas eta parto. La tuto efektive estas en harmonio, sed kiam certaj faktoroj superas en la konscio, disharmonio povas estiĝi, ĝis kiam oni povas superrigardi la situacion kaj ekhavas pli grandan perspektivon.

**2. Kristo ne estis martiro sed ekzemplo**

Kelkaj eble volas protesti, asertante ke la morto de Kristo sur la kruco estis ekzemplo de martireco. Sed tiel ne estis. Kiel do povus esti juste kaj prave, ke senkulpa homo suferis la morton de krimulo? Tio absolute ne estis por pacigi koleran Dion, sed tio estis por manifesti al la homaro ekzemplon pri la dieca homa konduto. Kristo konis sian mision, kiun li antaŭ ol li enkarniĝis sur la tero intime konis. Li sciis, ke li faris rompon de racio kiam li lasis sin krucumiĝi. Lia inteligento jam antaŭe diris al li, ke akcepti naskiĝi ĉi tie sur la tero signifos elmeti sian korpon al krucumiĝo. Sed se li ne lasus sin krucumi, la mondo neniam havus fundamentan demonstracion pri kiel la evoluinta homo surprenas la plej grandajn suferojn, kaj tiel la homoj ne estus tiel progresintaj en sia evoluo, kiel ili hodiaŭ estas. Per la vivo kaj estmaniero de Jesuo, lia morto sen malamo kaj amareco, sed male, preĝante por siaj ekzekutistoj, kaj per lia releviĝo, unue en spirita, kaj poste en plene materiigita korpo, la homaro ekposedis aron da eternaj veroj, laŭ kiuj la homoj povas vivi, kaj kiuj estonte havos senkompare grandan signifon, kiam la homoj ekkomprenos ties kosman aŭ universalan intencon.

La homoj komprenos, ke ili vivas la tutan tempon, sendepende de tio, ĉu ili troviĝas ĉi tie, aŭ estas "mortaj". Ili antingos klarecon pri tio, ke la spirito regu la materion kaj ne kontraŭe. Kiam la homo estas afliktita, amara aŭ elrevigita, tio estas indiko pri tio, ke la materio regas kaj ne inverse. Estas la kreoprincipo kiu regu la materion, estas nedigne lasi la materion regi la kreopovon. La homo devos esti la reganto de la vivo kaj materio. Sed tio postulas, ke la homo ekhavas superrigardon ne nur pri la malgrandaj partoj de la ĉiutago, sed li devas lerni vidi la kunligon de tiuj kun la kosma tuteco. Tion ĉi mi provas montri per miaj kosmaj analizoj. Mi montras al vi, ke la mio, kiu estas la fiksa punkto de la viva estulo, estas reganto de materio kaj ne inverse. Sed kial do ne ĉiuj homoj estas suverenaj, kial ili ne estas Kristoestuloj? Ni komparu tiun demandon kun alia demando. Kial iu homo estas infano kaj alia plenkreska homo? En ambaŭ kazoj validas, ke kiam la homoj ne estas atingintaj la saman nivelon, ne estas same maturaj, la kaŭzo estas, ke ilia spertado rilate al la kontrastoj de la vivo ne estas same ampleksa. Ĉia evoluo dependas de la travivadoj de kontrastoj. Kiam maturaĝa homo dum ĉi tiu vivo, povas pensi kaj agi alie ol malgranda infano, la kaŭzo ja estas la spertoj de la vivo, precipe la supre menciitaj spertoj kiuj rezultis el travivataj suferoj kaj malfacilaĵoj. Sed kio validas en la unuopa vivo, tio ankaŭ validas dum tiu evoluo, kiu okazas en tiel granda ciklo, kiun mi nomas spiralciklo de la evoluo. Kiam la homo povas agi alie ol la besto, kaj kiam eĉ evoluinta homo povas agi alie ol primitiva homo, tion kaŭzas la diferenco en ilia kosma aĝo en la evolua spiralciklo. Tio ja signifas la diferencon de iliaj spertoj rilate al la kontrasta principo. Estu kontrastoj en la vivo, alie la travivado de la vivo estus neebla. Ni nur kapablas percepti tion, kies kontraston ni jam spertis. Samgrade kiel oni travivis la efikojn de la malamo, oni povas travivi la amon. Ju pli altgrade oni renkontis mallumon kaj suferojn,

des pli altgrade eblas esti en kontakto kun la leĝoj de la vivo. Surbaze de la spertoj, la mio ekhavas kapablon regi kaj fizikan kaj spiritan materion, kaj kiam pli kaj pli da homoj hodiaŭ fariĝas serĉantoj kaj sopiras al paco, tio estas pro iliaj pli fruaj spertoj de suferoj dum multaj enkarniĝoj.

### 3. Spiralciklo, kontrastprincipo, la malagrabla bono kaj la agrabla bono

Iam ni vivis en la spirita, dia mondo kaj travivis la plej grandan harmonion. Tio estis antaŭ ol ni komencis travivi tiun evoluspiralon, en kiu ni nun situas. Tiam ni ne estis en fizika materio, sed en materio de multe pli perfekta speco. Tio estis en la lumzono de sube situanta spiralciklo. Ni restis tie tiel longe, ke ni satiĝis de ĉia lumo, ĉia amo kaj la plenperfekteco, kiun ni tie renkontis. Tial komencis nia sopiro al la kontrasto al tiu stadio, tiel tiaj kontrastoj fariĝis "lumo" por ni. Estas diece, ke oni povas ricevi la kontraston al tio, per kio oni satiĝis – alie la vivo haltus, ĉar ĉio fariĝus aŭtomata, kaj la estuloj fariĝus "robotoj". Kaj eĉ en la mondo de lumo, la stadio de roboto ne havus ion komunan kun la travivado de beleco kaj vivĝojo. La konscio de la viva estulo devas esti renovigita, por ke ĝi denove povu sperti la lumon, kaj tiu renoviĝo okazas per la malluma epoko de la venonta spiralo. La sopiron al la kontrasto al tio, per kio oni satiĝis, ni konas de la simbola rakonto pri Adamo kaj Eva. Ili estis en la Paradizo, en la lumo, kie ili rajtis ĝui ĉiujn objektojn, kaj nur unu objekton ili ne rajtis tuŝi, nome la kontraston, kiu allogis ilin, kaj do la pekofalo okazis. La kreado kaj pekofalo de Adamo kaj Eva estas simbola raporto pri la homa evoluo en la nuna evoluspiralo. Ni kreskis de la minerala regno, tra la planta kaj besta regnoj kaj venis al nia hodiaŭa stadio. "La pekofalo" ne estas io, kiu iam okazis, tio okazas la tutan tempon. Tio estas la realo de la providenca gvidado, kio estas esprimata aŭ simboligata per "la pekofalo", kaj sur tiu bazo la viva estulo kreskas de esti "en la nova spirala evolufeto" al tio, kio la teraj homoj estas ankoraŭ, kaj survoje al tio, kion mi nomas "la granda naskiĝo" aŭ kosma konscio, kie ilia mio denove atingos la plenan suverenecon super la materio kaj la nevenkebla vivkuraĝo.

Kiam la terhomoj do nun situas en la kulmino de la evoluspirala malluma zono kaj survojas al ĝiaj lumregionoj, tio estas ĉar ili mem elektis tiun vojon de mallumo. Sed nun ili deziras alian stadion, kaj iliaj sopiroj estos plenumitaj. Tiu plenumo ne okazas per mirakloj, sed per tio, ke la estuloj lernas krei al si tiun stadion, al kiu ili sopiras. Per la scio pri la mallumo, la lumo iom post iom estas kreita en iliaj konscioj. Ni decidas pri nia sorto kaj tio estas dia, ke ĉiam ekzistas tio, al kio ni ĝuste sopiras kiel lumoj antaŭe, kaj tio, pri kio ni satiĝis kiel mallumo malantaŭ ni. Tial ni reale ne povas paroli pri bono kaj malbono, sed pri la malagrabla bono kaj la agrabla bono. Nenio ekzistas, kio en si mem estas malbono, kaj kiam ne ekzistas io, kio en si mem estas malbono, ankaŭ ne povas ekzisti martireco. Kio do estas la tiel nomata martireco? Tio estas iluzio.

### 4. La terhomo estas en kosma instrua zono

La malgranda infano ofte elreviĝas, se ĝi ne ricevas tion, kion ĝi deziras, ekzemple akran tranĉilon. Tial ŝajnas al ĝi, ke la plenkreska homo estas "malbona", kiam ĝi ne volas doni al ĝi la tranĉilon. Ĝi ja ne scias, ke ĝia deziro povas esti danĝera por ĝi mem kaj la ĉirkaŭo. Kiam ĝi fariĝas pli granda kaj sufiĉe matura por ekhavi la sperton, tiam ĝi ricevas la tranĉilon kaj devas

lerni la konsekvencojn. Same la deziroj de la homoj povas esti danĝeraj, kaj eble iom da tempo pasas, dum iliaj deziroj je ilia granda elreviĝo ne estas plenumitaj, ĉar ili ne estas sufiĉe maturaj por la sperto ankoraŭ. Sed kiam ili estos, tiu venos, kaj ili travivu la sekvojn. Tiu ĉeno de kaŭzo kaj efiko aŭ la karmoleĝo ampleksas kelkajn reenkarniĝojn, dum kiuj la homoj semas, kaj iom post iom rikoltos tion, por kio ili estas maturaj. La plenumo de multaj el iliaj deziroj portas al ili doloron kaj suferon, kvankam ili atendis ion alian. Ĉiuj formoj de doloro kaj sufero estas kiel sonorilo sur ilia vojo, kiu sonoras, kiam ili devias de la ĝusta vojo, kaj tiu sonorilo kondukos ilin reen al la amo al la proksimulo kaj la vivkuraĝo. Estas vere, ke la suferoj de la homoj povas esti tre grandaj, tiel grandaj, ke ili, vidata en loka perspektivo, aperas maljustaj kaj sensencaj. Sed la homoj foje malobeas la vivleĝojn tre grandskale, kaj la efikoj estas proporciaj al la kaŭzoj. Tio kompreneble ne signifas, ke ĉar iu homo momente travivas grandajn malfacilaĵojn, ni devas rigardi ĝin kiel "grandan pekulon", kiu ricevas sian "punon", kaj ke oni pro tiu kaŭzo ne havus kompaton por ĝi aŭ la aliaj kun grandaj malfacilaĵoj. Ekzistas nenia "pekulo" kaj neniu "peko" rigardate el kosma perspektivo, ĉar nenio ekzistas, kio en si mem estas malbono. Kie la nescio finiĝas, la tiel nomata malbono ankaŭ ĉesas ekzisti. Ĉio ĉi signifas, ke kiam sufiĉaj spertoj estas faritaj kaj ekzistas en la konscio kiel scio pri la mallumo, scio pri la efikoj de la malagrabla bono, tiam la kontrasto de tio komencas efiki, nome la lumo en formo de saĝo kaj kapablo ami sian proksimulon, kaj tiu lumo do komencas elradii de la konscio kaj estmaniero de la estulo. En kunligo kun tia vibrado malsanoj, elreviĝo, amareco kaj malamo ne povas ekzisti. Tiuj tendencoj iom post iom malaperas, kaj la estulo estas trapasinta la "periodon de la pekofalo", kiu ne estas puno por io terura, kiu ne devus esti okazinta, sed evolua aŭ feta stadio antaŭ ol la estulo povos aperi kiel suverena homo laŭ la bildo de Dio.

**5. La fruktoj sur la arbo de saĝo estas la fruktoj de tiuj semoj, kiujn oni mem pli frue semis**

La homoj devas lerni la veron pri la vivo kaj per tio ankaŭ pri sia propra vivo. La religioj pli frue donis al ili impulsojn, sur kiuj ili povis bazi sian vivon, ĉar ilia religia instinkto kaj iliaj sentoj estis tre bona bazo por blinda kredo. Religia sugestio povis redoni al ili la vivkuraĝon, se ili estis perdanta ĝin. Sed tiel ne plu estas en tre multaj regionoj en la mondo kaj iom post iom la religioj malaperos de la tero. La inteligento de la terhomo estas evoluinta per la uzado en la materiaj kaj praktikaj kampoj, kaj nun la homoj por la plua evoluo en ilia vivo lernu uzi la inteligenton en kampoj, kie antaŭe kredo povis helpi. Inteligento tamen ne estas la samo kiel saĝo, sed ĝi estas unu el la ingrediencoj, de kiu la saĝo estas evoluinta. Tamen oni uzu ĝin en multe pli granda perspektivo, ol la homoj normale faras, kaj ĝi estu uzata en kunligo kun amo al la proksimulo.

Mi menciis antaŭe, ke "la pekofalo" okazas la tutan tempon. Jes, la terhomoj ja ĝuste estas "Adamo" kaj "Eva", kiuj manĝas la fruktojn de la arbo de la scio. La suferoj, malfacilaĵoj, la malsanoj kaj ĉio alia tiel nomata malbono estas kelkaj el tiuj fruktoj. Sed ili ĉiuj estas fruktoj de semoj, kiujn ili mem semis en la pasinteco per iliaj agoj kaj konduto. Pri kio la terhomo ricevas konon tra sia sorto en la ĉiutago? Ĝi ricevas konon pri tio, kion ĝi semis en la pasinteco en ĉi tiu kaj pli fruaj vivoj. Nun ĝi travivas la efikojn de siaj pli fruaj agoj. Tio estas instruado, spertiĝo kaj neniu puno. Tio igu ĝin pensi en

nova maniero, kio ankaŭ sekvigos novan kondutmanieron. Kiam multegaj homoj hodiaŭ ne povas devigi sin fari certajn aferojn, kiuj aliaj povas fari, estas pro tio, ke ili en sufiĉa grado travivis la sekvojn de tiaj agoj; ili sentas tiujn ene en si kaj ne plu povas elmeti aliajn al io simila. Iam la homoj kredis je religioj, kiuj similis al la malnova instruo pri la nordiaj dioj, kaj tiam la mallumo ankoraŭ estis "lumo" por la homoj. Tiam estis feliĉo esti mortigita sur la batalkampo, ĉar post tio oni venis al Valhalo [paradizmondo laŭ la nordia mitologio], kiu por ili estis la ĉielo, kontraŭe por ili estis malfeliĉo morti en sia lito aŭ pro maljuneco, ĉar tiam oni venis al la tiatempa infero. Tian sintenon la plej multaj homoj ne plu havas hodiaŭ, eĉ tiuj kiuj batalas sur la militkampoj. Ili ne plu batalas por la milito mem, sed por atingi pacon. Ne plu estas sporto por ili, kiel estis en la pasinteco. Sed ili spertos, ke tiu konscitransformiĝo ne sufiĉas por ekstermi la militon. Oni ne povas ekstermi ion per adori ĝin, kvankam oni faras tion per la plej bona intenco; oni devas lerni krei la kontraston al tio, kaj tio ĉi-kaze signifas: la pacon.

**6. La amkapablo kaj la inteligento estu uzataj en nova maniero**

La paco estu kreata de la unuopa homo, ĝi devas kreski el la konscio kaj konduto de la unuopa homo. Estiĝu kunlaboro en la homa menso inter ĝia amo al la proksimulo kaj ĝia inteligento. La vojo al la vivkuraĝo iras tra la amo al la proksimulo, sed kompreneble la homo lernu uzi tiun amon per prudento kaj inteligento. Multaj homoj opinios, ke plej ofte ne estas logike esti amema, sed kontraŭe plej nelogike kaj stulte. Sed tiaj homoj nek scias kio amo estas, nek kio logiko estas. Certe estas malfacile ami sian proksimulon kiel sin mem, kiam tiu estas malagrabla kontraŭ ni, eble eĉ persekutas nin. Sed Kristo ja ĝuste substrekis: "Vi amu tiujn, kiuj malamas kaj persekutas vin". Oni facile povas ami tiujn, kiuj estas agrablaj, amemaj kaj helpemaj al ni, tio ne estas defio. Sed ĉiujn tiujn, kiuj ne ŝatas nin, malfacilas ami; kelkaj opinias tion neebla. Multaj ankaŭ opinias, ke tio estas hipokrito, ĉar oni ja ne povas ami malbonajn kaj malagrablajn homojn. Sed ni ja konstatis, ke ne ekzistas io, kio en si mem estas malbona. Ekzistas io, kio estas malagrabla, sed ne ekzistas io, kio karakterizeblas kiel malbono. Kaj la malagrablo cetere estas – vidata en kosma perspektivo – malagrabla bono, ĉar per ĝi la estuloj evoluas, jes, estas pro ĝi, ke ili entute ricevis konscion por povi distingi inter la bono kaj la malbono, kiel nomiĝas en la rakonto pri "la pekofalo". Per la travivado de la efikoj de la malagrabla bono al nia propra korpo kaj en nia propra konscio dum multaj vivoj aŭ enkarniĝoj, ni ŝanĝiĝis de primitivaj besthomoj al la civilizitaj homoj de hodiaŭ, kiuj povas havi grandan kompaton kun malfacilaĵoj kaj suferoj de aliaj homoj, kaj kiuj ankaŭ havas sufiĉe evoluintan inteligenton tiel, ke ili povas kompreni la rilaton inter kaŭzo kaj efiko en multaj kampoj.

Multaj el tiuj civilizitaj homoj, kiuj havas grandan kunsenton kaj kompatkapablon, kaj kiuj ankaŭ evoluigis sian inteligenton, kiun ili uzas por logika pensado kaj agado en ilia laboro kaj alie, ja ĝuste estas tiaj homoj, kiuj dum certaj situacioj pro diversspeca "malboneco" perdas la vivkuraĝon kaj fariĝas deprimitaj, trompitaj kaj eble eĉ povas malsaniĝi pro ilia negativa mensa stadio. Ili opinias, ke ĉio estas senespera, kaj ilia propra situacio kaj la monda situacio, krome ili ne vidas iun solvon aŭ eblon atingi plibonigon. Ili fariĝas pesimistoj aŭ nigropensuloj, se ili ne iras la kontraŭan vojon kaj fariĝas tute indifirentaj, ĉar ŝajnas al ili, ke ĉio

estas sensenca. Por tiaj homoj mi kreis miajn analizojn, por helpi al ili uzi siajn amokapablon kaj kompaton kaj inteligenton en alia kaj pli pozitiva maniero, kio redonos al ili la vivkuraĝon.

**7. La vivvojoj de la terhomo**

Antaŭ ol la homoj ekkonas la veron pri la vivo, ili ne estas veraj homoj. Havos tre gravan signifon de la unuopa homo, kiam li aŭ ŝi – malantaŭ ĉiuj homoj, kun kiuj oni rilatas – povas vidi ilin kiel ilojn de Dio. Ili ĉiuj estas kiel la fingroj de Dio, kiuj modelas nin. Kaj nur estas bono, ke Dio kiel la skulptisto forigas ion tie, kie ni ne estas perfektaj. Multaj homoj absolute ne estas kontentaj pri si mem, se ili estu tute honestaj. Ili havas sopirojn kaj dezirojn pri esti alispecaj, fariĝi pli bonaj, pli inteligentaj kaj pli amemaj. Ili vere sentas, ke ili ne estas perfektaj. Sekve oni ĝoju pri tio, ke Dio laboras pri oni kaj montras al oni la vojon, kiun ni povas sekvi. Dio instruas ĉiun unuopan homon per tio, kio okazas en la ĉiutago de la koncernulo. Ĉio en la vivo, kio al la homo kiu uzas malgrandan lokan logikon, povas aspekti kiel hazarde kunplektitaj fadenoj, montriĝas, al tiu kiu komencas uzi la kosman logikon, viva komprenebla tuteco, en kiu nenio estas hazarda kaj nenio esta maljusta. Kiam ni havas martirsenton, ni vivas en superstiĉo, kaj neniu estulo povas fariĝi feliĉa vivante daŭre en superstiĉo.

Kompreneble mi renkontas kaj malagrablajn kaj agrablajn aferojn, sed mi scias, ke ekzistas io kio nomiĝas la agrabla bono kaj la malagrablo bono, mi scias, ke ĉio, kio okazas al mi, estas sinturno al mi de Dio, sammulte sendepende tra kiu persono tio okazas. Dio ne povas paroli al ni per unu sola estulo; ĉiuj estuloj estas iloj de Dio, kiujn li povas uzi, kiam li volas turni sin al estulo. Kiam oni do incitiĝas pro tiuj estuloj, oni reale incitiĝas pro Dio. Kiom longe oni incitiĝas pro certaj okazaĵoj, tiom longe ili revenos. La polurado ne finiĝas, antaŭ ol oni estas finpolurita. Tio estas la polurado de ĉiuj nepretaj flankoj de la konscio de la terhomo. Kial oni lasas sin incitiĝi pro aliaj homoj? Ĉar oni opinias, ke aliaj estu alispecaj, ol ili estas. La homoj estas tiom diversaj, kaj kompreneble ĉiu el ili estu precize, kiel li aŭ ŝi estas en tiu ĉi momento. Same kiel la bestoj estas kiel ili estas, kaj la plantoj estas, kiel ili estas. La homoj faras la eraron, ke ili postulas la samajn agojn de la malpli evoluitaj homoj kiel de la pli evoluitaj. Kaj ili malrespektas homojn, kiuj laŭ ilia vidpunkto estas malpli evoluitaj kaj eble ili mem estas snobaj ĝis kultado de tiuj, kiujn ili adoras. Nenio de tio estas ami sian proksimulon kiel sin mem; temas pri ami ĉiujn estulojn, ĉiujn ilojn kaj organojn de Dio kaj provi vidi Dion en ili. Se oni staras antaŭ malagrabla homo, oni memoru, ke estas onia propra karmo, kiu kondukis onin al renkonti tiun personon. Estas provo de toleremo kaj spirita ekvilibro. Oni provu konstati, kio tiu estulo momente estas kaj ankaŭ pensi pri tio, kio ĝi fariĝos estonte. Ĝi ja estas sur la plej alta punkto de sia ĝisnuna vivo, kaj oni ne povas riproĉi tiun homon, ke ĝi ankoraŭ ne havas spertojn, kiujn ĝi ankoraŭ ne faris, sed kiujn ĝi faros en la estonteco, kiam ĝi havos kosman konscion, kaj eble renkontos onin dum tute aliaj cirkonstancoj ol nun. Tion oni kompreneble ne diru al tiu homo, tiuokaze li aŭ ŝi eble kredus ke oni estas strangulo. Sed oni povas pensi en si mem: “Ankaŭ vi estas dia estulo, kaj al dia estulo oni nature montras amon”. Amo ja ne nur estas tuŝo sur la vango. Plej gravas fari tion, kio dum la donita situacio estas la plej amema ago sen ajna formo de amareco, kolero, trompado aŭ incitiĝo. Oni povas esti tre decidema sen esti amara, kaj oni ankaŭ povas atentigi alian homon

en ama kaj amikema maniero sen bati la tablon permane.

**8. La homo povas fariĝi ilo de la lumo**

Neniu de ni povas transformi alian estulon, kaj neniu renkontas ion alian ol tio, al kio ĝi mem estas la plej interna kaŭzo. Pro tio gravas ke oni uzu sian senton kaj inteligenton en la diversaj situacioj en la ĉiutago, provante pardoni kaj kompreni aliajn homojn. Ni ja ne havas pli bonan modelon ol Kriston, kiu sur la kruco povis diri: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras”. Se oni atingis tian stadion, oni estas nevenkebla, oni estas tute libera, eĉ se oni estus ligitaj de sklavoĉenoj. La homoj povas kateni la korpon, kiel oni ligas ĉiun alian substancon. Sed kiam oni ekkonas sian dian identon, oni scias, ke ili ne povas kateni la mion. Estulo kiu posedas vivkuraĝon, kiu estas akirita per amo al ĉio vivanta, ne estas ligebla, kiom ajn oni volas sklavigi lin. Jen nia situacio, neniu povas regi iun ajn krom sin mem. Estas ĝuste ke ekzistas kelkaj, kiuj sentas sin dependaj, jes, eĉ sklavligitaj de aliaj, sed la kaŭzo de tio ne estas la aliaj. La kaŭzo estas, ke la koncernulo mem enmiksis sin en sentecan rilaton, el kiu nur ĝi mem povas sin liberigi. Neniam la kaŭzo estas la aliaj, kaj ju pli oni komprenas tion, des pli oni liberigas sin de la katenoj de kolero kaj amareco, en kiuj oni mem ligis sin.

La celo de la mondliberigado estas, ke la homoj komprenu ĉi tiun ekziston kaj akceptu la instruadon pri la vivleĝoj, kiun ili ĉi tie povas ricevi. Imagu, kion signifus, se oni anstataŭ senti ĉagrenon pri tio kio okazas, uzus sian energion por kompreni, kial tio kio okazas estas la ĝusta ĝuste en la nuna situacio, bazita sur la pratempo, kaj kun vido al la utilo, kiun ni povos havi de la spertoj estontece. Oni ne lasu sin incitiĝi aŭ trompiĝi pro la konduto de aliaj homoj, same kiel oni ne estas trompita aŭ incitita pro tio, ke kardo aŭ leontodo ne estas rozo aŭ lilio. Kristo diris al siaj disĉiploj: “Iru en la mondon kaj faru ĉiujn popolojn al miaj disĉiploj, dum vi baptas ilin en la nomo de la patro, la filo kaj la sankta spirito.” Kio estas tiu bapto? La vera bapto, la sola kiu havas signifon, estas la ama interago kun la proksimulo en la ĉiutaga vivo. Doni lumon al aliaj per sia konduko, tio estas la vera bapto. Oni ne povas ŝanĝi aliajn, sed oni povas montri al ili ekzemplon, kiu efikas en la pli longa perspektivo. Kaj tiu ĉi lumo reale ne venas de oni mem, ĝi venas de Dio tra oni al la proksimulo. Tiel oni estas estulo, kiu per vivkuraĝo kaj amo montras la ĉeeston de Dio en la interago kun la proksimulo. Tiam ne estas martireckonscio, tiam la paco radias kaj lumas tra la homo, eĉ se ĝi situas sur militkampo.

*De prelego en Glahns Alle, marde la 1-an de aprilo 1941. Prelegaj notoj estis redaktitaj de Erik Gerner Larsson. Unua publikigo en dana Kosmos 4-5, 1969. Artikolo n-ro: M1450. La tekston esperantigis Henning Sato von Rosen kaj Hokan Lundberg.*



# La sekreto de la piramido

## Parto 1 el 3

de Ole Therkelsen

**1. La Sfinkso, la piramido de Keopso, Nostradamus kaj Martinus**

Nova kulturo komenciĝis per la konstruado de la tuta instalaĵaro kun la Sfinkso kaj la piramidoj en Giza sudokcidente de la nuna Kairo. Oni parolas pri la enigmo de la Sfinkso kaj la sekreto de la piramido. La Granda Dana Enciklopedio skribas: "Multaj mitoj jam de la antikveco estas ligitaj al la Sfinkso; interalie ĝi gardus sekretojn pri la estonteco de la mondo."

La Sfinkso estas kolosa statuo konsistanta el leona korpo kun homa kapo, situanta ĉe la piramidoj en Egiptio. – Al multaj la Sfinkso estas enigma figuro, sed al Martinus ĝi estas simbolo de la tera homo. Ĝi estas sfinksa estulo, estas duone besto kaj duone homo. (Logiko ĉap. 48-49 kaj Kial oni pardonu sian proksimulon, libro 17, ĉap. 8).

Lige al la sekreto de la piramidoj Billenstein skribas: "Estas en la profetaĵoj eldiroj kiuj sugestas ke ni staras antaŭ surprizaj malkovroj, kiuj kondukos al pli da ekkono pri la enigmoj de la ekzistado. En unu el la versoj, p. 128, interkonektiĝas Nostradamus, la Nila delto kun la piramido kaj la reĝo de Danio, kvazaŭ la piramido kaj la profetaĵoj suplementu unu la alian. Tion oni povas interpreti nur tiel ke



*La Sfinkso – Ilustraĵo el la enkonduka libro Logiko de Martinus*

venos klarigo pri la mistero de la piramido, simila al tiu kiu nun ebliĝis pri la profetaĵoj." (KPN, p. 168).

Se oni interpretas "la reĝon de Danio" kiel Martinus-on, oni tial povus atendi ke oni faros grandajn malkovrojn ligitajn al la piramido, kiuj iamaniere rilatos al Martinus. Eble oni trovos ekvivalenton de unu el la simboloj en malkovrota ĉambro de la piramido aŭ ie inter la antaŭaj piedoj de la Sfinkso? – Miaflanke tio estas nura spekulativo, sed eble oni trovos la simbolon de Martinus pri la vivanta estulo kun la triangulo, la cirklo kaj la radia kruco.

Multe da cifera mistiko kaj multaj esoteraj spekulativoj estas ligitaj al la piramido de Keopso, pri kiu oni povas multe legi en diversaj libroj.

Kvankam eble la tempo ankoraŭ ne estas matura por la rivelo de la sekreto de la piramido, tamen estas interese ke oni lige kun la plej lastatempa esplorado en la piramido nun malkovris la ekziston de antaŭe nekonata ĉambreto, kiu ĝis nun ne estas malfermita. En la televidaj kanaloj Discovery kaj National Geographic oni montris filmadojn de eta roboto aŭ aŭto, kiu veturis tra unu el la aerkanaloj de la piramido ĝis ĝi renkontis pordeton de nekonita ĉambreto.

**2. La granda Martinus-piramido en Kaŭkazo**

Laŭ la taglibraj folioj de Alf Lundbeck, tiel fruaj kiel la tempo de 1928-1932, Martinus rakontis kiel liaj simboloj restos neŝanĝitaj dum la tempoj. Nome iam en la estonteco estos starigita giganta piramido, pli granda ol la piramido de Keopso. Oni ĝin starigos kiel pruvon de tio kion la nuna homaro kapablas krei per helpo de la materiaj fortoj. Sur tri el la flankoj la plej gravaj simboloj estos montritaj kolore. Por rezisti la malkonstruajn fortojn de la vetero ili konsistos el metrojn dikaj koloraj ŝtonegoj kunmetitaj en mozaiko. La kvara flanko estos brile blanka – simbolante la principon de la triunuo.

Laŭ Lundbeck, Martinus ne konis la precizan situon de la piramido, li ne uzis sian kosman konscion pri tiu demando, sed li supozis ke ĝi eble situos en Ameriko. Poste en 1931 Martinus diris ke pli verŝajne estas ke ĝi situos en suda Rusio. Tio ne estis kosma analizo, ĝi estis io kion Martinus intuicie sentis. Rusio ja ankaŭ estis la unua lando kiu provis rompi la potencon de la kapitalismo, enkondukante la komunisman ŝtaton anstataŭe.

Ĉi tiu granda piramido, laŭ li, estos centro de la plej alta spirita vivo de la tero. La plej altaj universitatoj kaj instruejoj pri la spirita scienco de Martinus situos en la regiono ĉirkaŭ la piramido.

Lundbeck plue skribas ke ĉi tiu piramido certe ne estos starigita dum la vivo de Martinus, sed kredeble estos farita malpli granda modelo dum li ankoraŭ vivas. Al la familio Lundbeck Martinus montris la desegnojn kiujn li provizore skizis. Laŭ Lundbeck aperos en *Livets Bog* pli preciza priskribo kun desegnoj, tiel ke la piramido povos esti konstruita laŭ ili. Tio ĉi tamen ŝajnas al mi tute malprobabla, ĉar en *Livets Bog* estis donotaj nur logikaj analizoj, ne troviĝus profetaĵoj – kaj tute ne pri estontaj konstruaĵoj kaj ilia eventuala konstrukcio. Lundbeck kredeble supozis ke la skizoj de simboloj kiujn Martinus en 1932 finfaradis por la eldono de *Livets Bog 1* estas skizoj de konkreta piramida konstruado. La unua, sepa kaj oka simboloj en LB1 nome montras evoluan ŝtuparon kun evolu-ŝtupoj aranĝitaj en piramida formo. Tiuj tri simboloj estas publikigitaj ankaŭ kiel numeroj 27, 28 kaj 29 en la simbolaro de *La Eterna Mondbildo* (vol. 3).

Estis diversaj supozoj pri tio kiam estos do formita la spiritscienca monda centro en Kaŭkazo, priparolita de Mar-

tinus. En ĵaŭda kunveno la 30-an de marto 1978 kunlaboranto faris privatan notaĵon, kiu indikas ke post 2000 jaroj.

Martinus: “Ni loĝas en la plej bona loko de la planedo. Skandinavio estos elektita dum la venontaj 2000 jaroj. Ĉi tien venos la grandaj kosmaj impulsoj. Post 2000 jaroj la centro situos en Kaŭkazo.” (Notico en Kosmos n-ro 3/2005).

Martinus ricevis iujn impulsojn rilate Kaŭkazon, sed li ne esploris tion pli precize, li ne faris analizojn pri Kaŭkazo. Devis esti moralo ankaŭ en la kosma kampo. Ankaŭ estus misuzo de kosma konscio esplori unuopajn personojn, kaj kiel utilis ke li skribu multege pri Kaŭkazo, se la tero ne ekhavos kosman konscion ĝis post 3000 jaroj?

### 3. La malgranda Martinus-piramido en Klint

Antaŭ sia forpaso Martinus esprimis la deziron ke lia ĉerko staru en malgranda piramido. (Vidu la venontan ĉap. 10). Tio estis diskutata en pluraj konsiliaj kunsidoj, kaj konsiliano Henning Laug (1913-1992) faris kartonan modelon, kiu plaĉis al Martinus.

Troviĝas surbenda registraĵo el la 5-a de marto 1970, kiam Martinus havis longan interparolon kun arkitekto Boe Seest pri la malgranda piramido kaj pri la aranĝado de la infanaĝa hejmo en Sindal. La 11-an de aŭgusto 1990 je la centjariĝo de la naskiĝo de Martinus, la infanaĝa hejmo estis restaŭrita aŭ pli ĝuste rekonstruita tiel kiel ĝi aspektis dum la junaĝo de Martinus, kaj tio okazis ĝuste laŭ desegnoj kiujn Boe Seest faris laŭ klarigoj de Martinus mem. Ili diskutis ankaŭ kiel konstrui kaj kie loki la la piramidon kiun Martinus deziris konstruigi en Klint, 6 km okcidente de la urbeto Nykøbing Sjælland – volonte proksime al la vilao Rosenberg, kie li loĝadis dum la somera ferio. Post la forpaso de Martinus la eklezia ministerio tamen neniel volis permesi tion. Nepris aŭ entombigi Martinus-on en la teron, aŭ meti lian ĉerkon en iun ekzistantan kripton aŭ maŭzoleon de dana preĝejo.

Koncerne la malgrandan Martinus-piramidon aperis ideoj ke la malgranda piramido povus esti lokita ene de alia konstruaĵo, kies internan spacon oni eventuale povus fari ses-angula, ĉar Martinus ja antaŭsupozis ses regnojn kaj ses fundamentajn energiojn. La malgranda piramido eventuale ankaŭ estus lokebla ene de alia pli granda piramido, en kiun oni do povus enpaŝi. Ekzistas desegnoj por la konstruo de la malgranda Martinus-piramido.

Sed kiam Martinus iam estos pli vaste konata, oni eble povos atingi permeson konstrui privatan maŭzoleon, samkiel okazis ekzemple al la konata produktoro Ole Olsen (1863-1943) sur la bela panoramejo Esterhøj en Høve nur 12 km for de Klint. En 1906 Ole Olsen komencis la Nordian Film-Kompanion, kies unua produktaĵo, interese, estis raportaĵo pri la sepulto de la reĝo Kristiano la Naŭa. La reĝo estis balzamita kaj sepultita en la Ĉefpreĝejo de Roskilde same kiel longa vico da antaŭaj danaj gereĝoj.

### 4. La vizitoj de Martinus ĉe la piramidoj

Dum la tempo ĉirkaŭ 1930 Martinus laŭ Lundbeck tre ŝatus iri al Palestino kaj al Egiptio por vidi la sanktajn lokojn, la piramidon de Keopso kaj la Sfinkson. Li tre ŝatus vidi la piramidon en lunlumo sen ia akompano, kaj li opiniis ke tia vizito treege gravos al li, kiam li konstruos la desegnojn por sia propra piramido. Martinus diris ke li povus astrakorpe iri tien kaj vidi ĉion kion li volus, sed tio tamen ne estus la sama afero kiel fari tion fizikakorpe.

Martinus antaŭe havis travivaĵojn kie li elkorpiĝis kaj subite trovis sin

interalie en Damasko, Jerusalemo kaj sur sudmara insulo.

Martinus: “Estis al mi klare ke mi detruos mian inteligenton se mi daŭrigos tiujn eksperimentojn. Kaj ĝuste bezononte la inteligenton treege multe, mi ne plu kuraĝis tion fari. Oni ja povas simple vidi la spiritismajn mediumojn, kiuj estas emocie tre evoluintaj je kosto de la inteligento. Ili ne plu havas proprajn opiniojn, sed devas demandadi kaj demandadi la spiritojn senfine.” (Memoroj de Martinus, paĝo 81).

Sed tiu vojaĝo povis okazi nur konsiderinde pli malfrue en la estonteco. Martinus estis ligita al siaj devoj kaj ne povis forlasi sian laboron por tiel longa daŭro kiom estus postulite – kaj antaŭ ĉio li tute ne havis monon por tia vojaĝo.

30 jarojn poste, finverkinte *La Libron de la Vivo* en decembro 1960, Martinus komence de 1961 akceptis proponon de pagita vojaĝo al Egiptio kaj Palestino kun du bonaj amikoj, Peter Zacho (1911-1991) kaj Eilif Sam Zinglersen (1912-2007) (Memoroj de Martinus, paĝo 138). Redaktoro Sam Zinglersen, iom bone gajninte per eldono de krucvortenigma revuo, pagis la vojaĝon al Martinus, same kiel li en pluraj aliaj ekonomiaj rilatoj estis granda helpo al Martinus.

La vojaĝo al Egipitio komenciĝis en oktobro 1961. En la hotela ĉambro en Kairo apud la piramidoj Martinus tute spontane ricevis spiritan vizion kiu daŭris plurajn minutojn. Li sentis ĝin tiel kvazaŭ unu muro de la hotela ĉambro malaperas kaj fariĝas vidaĵo, kie montriĝas al li la piramidoj en sia junaĝa gloro. Ne estis dezerto, estis palmoj, la templaj haloj sparkis kaj brilis, la piramidoj estis brilpuraj kaj blankaj, kaj la pintoj estis orumitaj.

En sia klarvido Martinus travivis siajn viziojn en koloroj. En kunveno li rakontis ke li iun tagon vidis plej belan bluan flamon leviĝi el eta bronza piramido, kiun li iam ricevis donace. Pro



*Martinus ĉe la Sfinkso kaj la granda piramido en 1961.*

tio kaj pro aliaj eksperimentetoj kiujn li faris per tiu piramido, li konvinkiĝis ke estas speciala forto en la piramida formo.

Martinus ĉiam rezervis siajn spiritajn kapablojn por la kosmaj analizoj, sed povis okazi ke li, ne dezirante tion, spontane travivis spiritan vizion. Ĉar li la tutan vivon laboradis pri la spiritaj aferoj, la vando inter la fizika kaj la spirita kampoj fine iĝis tre maldika, kaj kiam li 90-jara sidis en sia fotelo kaj ekrigardis la plankon, li fojfoje povis vidi florabundon aŭ herbojn kun floroj flirtantaj en la vento. Li demandis la ĉeestantojn ĉu ili vidas la florojn; ne, ili ja ne vidis.

Per sia intuicio aŭ kosma konscio Martinus ricevis *sian scion en la konscion en formo senkolora kaj senvorta,* kiun li poste devadis akomodi kaj vortigi, farante siajn kosmajn analizojn. Martinus ne uzis siajn kosmajn kapablojn por profetadoj aŭ por unuopuloj, nek cetere por sia propra persono. Estis moralo ankaŭ pri la apliko de kosma konscio. Ĝi ne estu misuzata por esploroj de personaj rilatoj aŭ nur por kontentigi iun scivolemon.

*Daŭrigo 2/3 sekvas. Pli da informoj en "Martinus kaj la nova monda moralo", www.martinusshop.dk. La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.*

## Resuma klarigo de simbolo n-ro 12. La kombinoj de la bazaj energioj

La vivanta estaĵo kreas sian konscion pere de la ses fontoj de energioj aŭ la ses bazaj energioj de la universo. La kombino de la ses energioj determinas al kiu el la ses ekzistoregionoj de la spiralciklo apartenas la estaĵo. Danke al la eterna kosma principo de malsato kaj satiĝo, la estaĵo moviĝas cikle tra la ses regnoj de ekzistado. Tiamaniere estas la propraj deziroj kaj volo de la estaĵo kiuj gvidas ĝin tra la mallumaj regionoj de la ciklo same kiel tra la lumaj regionoj.

**La ĉefaj detaloj de la simbolo**

- La koloraj figuroj inter la nigraj horizontalaj strioj reprezentas la regnojn de ekzistado.
- La regno de ekzistado plej malsupre, indikita per la du indigaj rektanguloj je ĉiu flanko, reprezentas la regnon de beateco ĉe la fino de spiralciklo. Poste sekvas novan spiralaciklon konsistantan el la ses regnoj de ekzistado: ruĝa – planta regno, oranĝa – la besto-regno, flava – la vera homa regno, verda – la regno de saĝo, blua – la dia mondo kaj indiga – la regno de beateco. La ruĝa koloro ĉe la supro indikas la komencon de la planta regno de la sekvanta spiralciklo.
- La ses vertikalaj figuroj en la mezo montras la disvolviĝon de la bazaj energioj. Ĉi tio okazas kiel eterna, ritma movo el latenta al kulmina stato, kaj reen al latenta, kaj tiel plu.

# Ĉu la rekono de reenkarniĝo influos al la monda moralo?

## de Martinus

M3016

*Kiun influon al la moralo havas la kompreno pri la vivo kaj konduto de la homoj? – Ĉu rekono de la reenkarniĝo havos signifon por la mondmoralo? – Al tiuj demandoj Martinus respondas en ĉi tiu artikoleto.*

Tiel longe kiel la reenkarniĝo ne estos akceptita de la publika opinio aŭ la granda plimulto de la tera homaro, tiam absolute perfekta humana aŭ justa mondmoralo neniel havas influon. Tiel longe kiel oni ne komprenas la reenkarniĝon, tiam koncepto pri la vera aŭ absoluta mondbildo estas maleblo. La moderna materiisma mondbildo ne estas reala mondbildo. Ĝi estas nur aro da analizoj pri la vojoj kaj substanca enhavo de la planedoj kaj galaksioj, alivorte scio kiu ne havas la plej etan influon al la mondmoralo mem. Kaj tiel longe kiel la fizika-psika mondbildo estas nekonata, tiel longe ĝiaj strukturoj kaj leĝoj, kaj sekve ankaŭ ĝiaj leĝoj de moralo, estas nekonataj. Ĝuste tiu nescio nuntempe kreas la sekvajn esprimojn: “Ne ekzistas justo”, “La vivo estas rezulto de hazardoj”, “Ĉiu nur por si mem” ktp. Kaj oni formas sian vivmanieron sur tiu bazo. Oni ne povas kompreni ke povas ekzisti justo en mondo kie oni vidas iujn infanojn naskiĝi al malsano, mankego kaj mizero, kaj ekhavi senamajn gepatrojn kiuj eĉ edukas ilin por fariĝi krimuloj, dum aliaj infanoj naskiĝas al vivo en riĉo kaj bonfarto, protektitaj de amaj gepatroj kaj havas aliron al la plej honoraj kaj plej estimataj rondoj en la socio. Iuj infanoj naskiĝas kun tre malgrandaj kapabloj, dum aliaj naskiĝas kun brilaj intelektaj kapabloj kaj dispozicioj. Unu infano naskiĝas kiel geniulo, dum alia naskiĝas kiel spirita malkapablulo. Iuj estuloj estas sklavoj kaj devas laboregi kaj streĉi por aliaj, kiuj do povas vivi altnivele, povas havi luksan vivon surbaze de la laboro de tiuj sklavoj. Iuj estuloj mortas pro ekscesa manĝado kaj maldiligenteco, aliaj mortas pro malsato kaj trostreĉo. Iuj infanoj mortas tuj post la naskiĝo, dum aliaj atingas la aĝon de cent jaroj. Iuj infanoj naskiĝas kun treege granda kaj afabla psiko, dum aliaj naskiĝas kun psiko kiu kapablas krei nur banditismon aŭ gangsterismon. Kiel povu esti justo en mondo kie ĉio ŝajne estas tute sensenca, kaj kie la vivbonaĵoj estas tiel malegale disdividitaj? –

La eklezia kristanismo klopodas kompensi tion per religiaj dogmoj aŭ tradicioj esprimantaj la mondbildon kiel ĉiopotencan Dion kiu estas la kreanto kaj reganto de ĉiuj vivaj estuloj, sed per tiu bildo la eklezio ne povis montri okazaĵojn kiuj faras la mondbildon kulminaj justo kaj amo. En tiu sia senhelpo ĝi necese kapitulacis kun la esprimo: “La vojoj de Dio estas neesploreblaj”. Tio kio kondukis la eklezian kristanismon al tiu intelekta kapitulaco aŭ malkapablo, kaj al la sekva membroreduktiĝo, estas ĝia predikado pri Dio kiel ĉiopotenca, ĉioama kaj ĉioscia, kiu tamen lasas grandegan plimulton de siaj kreitaj estuloj veni en

eternan inferon, alivorte en mizeron kaj suferon el kiu eterne ili ne povas liberiĝi. Tiu terura sufero karakteriziĝas kiel puno pro pekoj aŭ eraroj faritaj en unuopa tera vivo. Kiel eterna aŭ senfina puno povas esti natura aŭ justa rilate al portempa aŭ templigita peko? – Kaj kiel la kreaĵo povas esti punenda pro sia propra neperfekteco? – Ĝi ja ne kreis sin mem, sed estas produkto de kreanto. Ĉu ne tiu kreanto mem necese havas la respondecon? – Se tiu kreanto estas ĉiopotenca kial li do kreas estulojn, pri kiuj li – pro sia ĉioscio – anticipe scias ke ili venos en inferon? – Se li ne povas krei siajn estulojn perfektaj, li ne estas ĉiopotenca. Kaj se li ne anticipe scias ke ili venos en inferon, li ne estas ĉioscia, kaj se anticipe li scias ke ili venos en inferon, sed ne deziras liberigi ilin de tiu granda sufero, ja eĉ sendas la plej grandan parton de siaj kreitaj estuloj tien, do li ne estas ĉioama. Imagu se tia Dio estus mense esplorita. Kia estus la diagnozo? – Kreanta estulo kies plej granda faro estas kreo de vivaj estuloj kun mensa aŭ spirita strukturo, kiu senhelpe juĝas ilin al senĉesa vivo en kulmino de doloro kaj sufero kaj en kiu stato ili vane eterne elkrias sian mortosuferon al sia komplete sensenta kaj senkompata kreanto, kies ĉiopotenco kaj ĉioscio povus malhelpi tiun tutan diablan panoramon kaj anstataŭe krei sunluman, brilan vivon por ĉiuj, tia estulo ne povas havi en si ian ajn ereton de amo. Ĉar la estuloj en infero neniam eterne povus liberiĝi de siaj suferoj, do ilia restado tie estus komplete senigita de ia ajn utila aŭ bona celo por ili mem. Kiam la ĉiopotenca Dio mem tamen neskueble tenas tiujn estulojn en eterna sufero, tiam la kaŭzo ekskluzive povas esti ke tio estas ĝuo por li. Sed estulo por kiu estas agrable vidi vivajn estulojn senhelpe tenitaj en teruraj suferoj povas esti nur abnorma. Lia diagnozo povas esprimiĝi nur per tiu unu vorto: "sadismo".

Ĝuste tiu esenca diablo kaŝita en la malnoviĝinta formo de la dogmoj, tiu centprocenta paganeco en malnovaj religiaj tradicioj, forigas la homojn de la eklezia kristanismo samgrade kiel ties adeptoj komencas mem pensi. Oni komprenas ke necesis ama estulo aŭ Kristo en karno kaj sango por igi tiun sadisman bildon de mondmastro paliĝi, disfali kaj ruiniĝi. Al la evoluinta esploristo tiu bildo de malsana Dio neniel povas doni inspiron kaj trankviligan certigon pri justo, kaj sekve ne povas doni fundamentan bazon por kreado de pli alta moralo.

Ĉar ankaŭ la aliaj grandaj mondreligioj enhavas ampleksajn paganajn dogmojn aŭ imagojn, kiuj ne povas rezisti veran intelektan prilumon, do ankaŭ tiuj religioj senhomiĝas samgrade kiel la propraj intelektaj kapabloj de la estuloj funkcias. Paradizaj ĉieloj kun senanimaj valkirioj, la timo fariĝi krokodilo, serpento, sepio aŭ alia rampulo se oni ne plenumas la postulojn de la religio, ankaŭ ili malaperos kiel mallumaj ombroj pro la intelekta lumo. Kaj la homoj bezonas serĉi novajn mensajn aŭ psikajn bazojn por moralformado.

Kiel menciite la moderna materia scienco povas doni al la homoj nur analizojn de substanco aŭ materio, kaj tial ĝi neniel povas solvi la vivmisteron. La vivo konsistas nome ne nur el substanco aŭ materio, sed ankaŭ el tiu vivo kiu direktas kaj prezentas sin pere de la substanco aŭ la materio. Tial la menciita scienco neniel povas formi bazon por moralo. Spirita aŭ mensa mallumo, sendieco aŭ rifuzo de ekzistanta providenco regas la ĉiutagan vivon en la regiono de la materia scienco. Tial posedo de la plej grandaj armeo kaj floto aŭ militpotenco kun la plej eble granda kapablo mortigi, murdi kaj detrui, sekve estu konsiderata kiel la absolute sola efika sekuriga aranĝo aŭ la plej bona protektilo. Tial tie ĉio pli estas demando de potenco ol de rajto. Kaj tie la tera homo

kiu estas tre talenta en la materiaj scio kaj povo, necese estu en la besta stadio kaj aranĝu sian vivon laŭ la ĝangala moralo: La rajto de la pli forta. La homo devias de la besto per tio ke ĝi estas etika estulo, kio signifas ke ĝi estas destinita vivi laŭ la principo "Rajto superas potencon". Tial ĝi ne povas vivi laŭ la ĝangala leĝo: "Potenco superas rajton", sen tio ke ĝi subfosas sian veran homan vivtravivadon kiu estas konstantaj paco, feliĉo kaj ĝojo bazitaj sur la kompreno pri kaj amo al ĉio kaj ĉiuj. La ĝangala moralo povas doni al la tera homo nur bestan vivtravivadon, kiu estas la samo kiel konstanta atentado pri timataj malbonoj, malfeliĉoj kaj suferoj, kiuj ĉe la teraj homoj estas plifortigitaj samgrade kiel tiuj estuloj fortigis sian bestan agadon per artefaritaj defendiloj kaj atakiloj. Kaj nuntempe tiu fortigita praktikado de la ĝangala leĝo estas mondmoralo. Surbaze de ĝi okazas la decidoj pri la rilato inter ŝtatoj kaj popoloj. Tial estas memkompreneble ke la vivo samgrade fariĝas besta anstataŭ homa, fariĝas milito anstataŭ paco.

Post tiu kapitulaco en religio kaj materismo la nun komenciĝanta spirita scienco – kun siaj kosmaj analizoj de la viva io mem malantaŭ la mistero aŭ substanco, kaj per tio analizoj de la vera fizika-psika mondbildo – estas la sola nun malkovrita kaj irebla vojo al la mondpaco. Tie la reenkarniĝo aŭ la eterna ekzisto de la individuo interpretiĝas sur neskuebla logika bazo. Pere de la kono pri tiu eterna esto oni vidas ke oni mem estas la unua origino, kreanto kaj realiganto de sia propra sorto, kaj ke ĉiuj niaj kunestuloj kaj ĉirkaŭaĵoj neniam en ia ajn kazo povas esti la kaŭzo de tio kie ni naskiĝas, kiujn ni ekhavas kiel gepatrojn, en kiun medion kaj en kiujn cirkonstancojn ni venas, kaj kiujn malfeliĉojn kaj suferojn aŭ aliajn formojn de malagrablo ni travivos. Tiuj menciitaj estuloj kaj ĉirkaŭaĵoj neniam povas esti io alia ol tiuj rimedoj aŭ iloj pere de kiuj ni mem per nia propra naturo, konscie aŭ nekonscie, realigas kaj formas nian propran vivtravivadon, kiu ja estas la samo kiel nia sorto. Nia sorto povas ekskluzive esti nur efikoj de kaŭzoj kiujn ni mem realigis, parte en la nuna kaj parte en antaŭaj teraj vivoj. Tial ne troviĝas rajta bazo por fariĝi kolera kontraŭ iuj, kaj ne por riproĉi iujn pri iu aŭ alia malagrablo, en tiu aŭ alia okazaĵo en nia sorto. Ni vidas ke ĉiuj malagrablaĵoj estas efikoj de nia propra neperfekteco en vivarto aŭ konduto, kaj ke sekve ni lernas de ĉiu malagrablo kaj ĉiu travivaĵo.

La analizoj de la spirita scienco pri reenkarniĝo kaj mondbildo sekve tute forigas la grandan superstiĉon ke iuj povas fari maljuston kaj iuj povas suferi maljuston. Ĝi forigas ĉian ajn bazon de martireco kaj montras ke ĉia formo de malamo, kolero, envio aŭ mallonge dirite ĉia formo de senamo, estas faloj kaj eraroj de la ankoraŭ nefinevoluinta aŭ kosme blinda tera homo. Faloj kaj eraroj donas spertojn, spertoj kondukas al vivscio, kaj vivscio kondukas al kosma klarvido aŭ kosma iniciĝo, kiu estas bazo por perfekta humana homo aŭ estulo laŭ bildo de Dio. Tial ĉiuj faloj kaj eraroj sekve fariĝas utilaj kaj nemalhaveblaj en la dia mondplano, kaj per tio ili montras ke la eternaj vortoj: "Ĉio estas tre bona" estas fakto. Kiam la kosmaj analizoj de la reenkarniĝo fariĝos evidenta maldorma, tagokonscia konstato ĉe la plimulto de la tera homaro, tiam la amo ŝovos la ĝangalan leĝon for de la aktuala mondmoralo. Kaj tiam harmonio kaj paco, arto kaj scienco, belo kaj ĝojo estos la regata, lumanta ligilo inter ĉiuj homoj, nacioj, rasoj kaj individuoj de la tuta mondo.

*Originala dana titolo: Vil erkendelsen af reinkarnationen få betydning for verdensmoralen? Unua publikigo en demando 16, letero n-ro 10, 1950. Traduko Ib Schleicher el dana Kosmos n-ro 3, 1984. Artikolo n-ro: M3016.*



# Esperanta prelego pri la nova monda kulturo en Martinus-Centro

## de Javier Romero

La 5a de aŭgusto de 2019 okazis esperanta prelego en Martinus-Centro, en Klint. Ĉi tiu prelego estis la rezulto de la propono de Solveig Langkilde al la grupo de esperantistoj, kiuj en la internaciaj kursoj de la somero de 2018, ĉeestis en la Centro Martinus. En vesperaj renkontiĝoj la grupo de esperantistoj babiladis pri kiamaniere oni povus helpi por ke Esperanto estu videbla en Martinus-Centro en la venontaj jaroj. Elfluis multaj diversaj ideoj, kaj jen venis la vesperon en kiu Solveig proponis ke en la somero de 2019 povus esti bona ideo ke estu esperanta prelego. Tiun proponon recevis kaj aprobis la respondeculoj de la instrugrupo de Martinus-Centro.

La interpretado de la prelego estis farita al la dana lingvo de Jonas Dalmose kaj al la angla de Ole Therkelsen. La temo elektita por la prelego estis la nova monda kulturo kaj por prepari la enhavon mi uzis la sonregistraĵon de la parolado de Martinus al junaj volontuloj dum la labortagoj en la sankta semajno en la Centro Martinus, la dimaĉon 26an de marto de 1978 (La sonregistraĵo aperis kiel artikolo unuafoje en la dana Kosmos 3/2004.), la artikolon “La nova monda kulturo post ragnaroko”, kiu baziĝas en la sonregistraĵoj de la parolado de Martinus dum konsilia renkontiĝo malpli ol tri monatojn antaŭ lia forpaso la 8an de marto 1981, kelkajn partojn de Livets Bog 1 kaj fine la libro de Ole Therkelsen “Martinus kaj la nova monda moralo”.

En la komenco de la prelego mi klarigis al la aŭskultantoj kial estas bona ideo ke estu ĉiusomere almenaŭ unu prelego en Esperanto ene de la internaciaj kursoj kiujn oni organizas fine de julio kaj komence de aŭgusto. Ili povis vidi al la sveda ministrino pri kulturo paroli kaj saluti al la partoprenantaro de la finnlanda Universala Kongreso de Esperanto kaj konstati ke Esperanto ne estas afero de la estonteco sed ke ĝi estas aktuala lingvo kaj ke meritas la penon helpi al la disvastigado de Esperanto. Krom tio mi memorigis al la aŭskultantoj kiuj ĉeestis en la prelegejo de la Centro Martinus ke Martinus mem decidis ke Esperanto estu la oficiala internacia lingvo de la Instituto Martinus en la konsilia kunveno de la 5an de aprilo de 1965. Martinus ne skribis en sia verkaro kiu lingvo estos la estonta internacia lingvo de la tuta homaro sed en demanda leciono iam oni demandis rekte al Martinus pri kiu lingvo estos tiu internacia lingvo kaj Martinus respondis ke tiu lingvo estos Esperanto.

Post tiuj klarigoj pri la pensoj de Martinus rilate al Esperanto kaj la graveco de la neŭtrala internacia

lingvo por la Centro Martinus mi proponis al la aŭskultantoj imagan ludon aŭ imagan vojaĝon. Ni komencis nian vojaĝon en la komeco de nia spiral-ciklo ĝuste en la beata regno. Ekde tie ni faris resumon de nia vojaĝo en la minerala regno, la planta regno kaj la besta regno en kiu ni ankoraŭ troviĝas kiel teraj homoj.

La piramidoj, la sfinkso, Moseo, Kristo … kaj Martinus. Ekde ĉiam la plej altaj evoluintaj homoj venis al la Tero por helpi al la tera homo evolui kaj maturiĝi. La verkaro de Martinus, La Tria Testamento, la spirita scienco de Martinus estas ĉio kion Kristo ne povis rakonti al tiamaj teraj homoj kaj pro tio li devis promesi sendi tiun Sanktan Spiriton en la estonteco. Kaj tiu Sankta Spirito, tiu plej alta saĝo pri la vivo kaj la eternaj principoj de la universo alvenis al la Tero de la mano de Martinus por montri al ni kiamaniere venki finfine ĉian restaĵon de egoismo aŭ besta konscio.

La teraj homoj troviĝas nuntempe en grandega transformiĝo. Oni devas kompreni ĉi tiun seksan transformiĝon de la vivaj estuloj por kompreni tion kio okazas nuntempe en la mondo kaj en la rilatoj inter la homoj.

La celo de la nova monda kulturo estas krei la veran pacon sur la Tero. Unu mondo en kiu ĉiuj landoj unuiĝas en unu monda registaro kaj organiziĝas laŭ la kristomoralo. La nova monda kulturo montras al la homoj ke estontece la homoj evoluos kaj fariĝos perfektaj finpretigitaj homoj, dupolusaj vivaj estuloj.

La celo estas transformiĝi en la filo de Dio simila al Li, esti kiel Kristo. Esti Kristo estulo, kiu pardonas ĉion ĉiam al ĉiuj. Estulo ĉioama kiu estas matura por komenci vivi kaj sperti en la perfekta homa regno, unue fizike, kaj poste en la spiritaj regnoj. Pri ĉi tio temas la nova monda kulturo … Kaj Esperanto havos gravan rolon en ĝi.

SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo. Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

# LIBROJ EN ESPERANTO

La libroj de Martinus verkaro **La Tria Testamento** estas tradukitaj en la albana, angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda lingvo kaj Esperanto. –

**Livets Bog 1**

**La Eterna Mondbildo 1-4** – Libroj kiuj klarigas la simbolojn de Martinus

**Logiko**

**Sepulto**

La libretoj:

1. **La sorto de la homaro** – Pri la principoj laŭ kiuj evoluas la homaro.
2. **Pasko** – La mondhistoria pasko-evento estas analizita tiel, ke ĝi klare reliefiĝas.
3. **Kio estas la vero?** – Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke estas grave kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi.
4. **Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio** – Tio kio instigis Martinus verki kaj la praktikaj sekvoj.
5. **La ideala nutraĵo** – La homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.
6. **Folioj el la bildolibro de Dio** – Poezia verko, en kiu i.a. amplena priskribo de tansiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkontiĝo inter du homoj.
7. **La idolo plej longe vivanta** – Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.
8. **La homaro kaj la mondbildo** – Traktas la homan vivon laŭ novaj vidpunktoj kaj ĵetas lumon sur malnovajn kaj novajn problemojn.
9. **Inter du mondepokoj** – Traktado de tiu tansira situacio inter primitiveco kaj humanisma vivoformo, en kiu vivas la nuntempa homaro.
10. **Kosma konscio** – Mensa suvereneco.
11. **La mistero de la preĝo** – Klariĝas la preĝon Patro Nia kaj kiel preĝado povas esti scienco.
12. **La vojo al iniciĝo** – Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. – Donacokulturo.
13. **La kristnaska evangelio** – Pri Jesuo kaj la evoluo de la homarao.